

August Heinrich Hoffmann,
Alveno de l' printempo

tradukita de Manfred Retzlaff

Ree nun verdiĝas ĉio
Sur herbejo kaj kampar'.
Kaj ekestas eŭforio
Anstataŭe de malklar'.
Jes, post vintra la sufero
Printempigas je la fin',
Regas ĝojo sur la tero,
Tio feliĉigu nin.

Vidu, tie papilio
Flugas en printemp-ornam',
Ĝi anoncas, ke nun ĉio,
Kio mortis, vivas jam.
Nur violoj rigardantaj
Jen timeme al la sun'
Estas kvazaŭ demandantaj :
« Ĉu printempas vere nun ? »

Vidu, la alaŭdoj tie
Super ni en la aer' !
Ili kantas idilie
Por ni sube sur la ter' !
Nun forfuĝas la sufero,
Printempigas ĉie ĉi –
Printempigas sur la tero
Ankaŭ en la Brust' al ni !

*Traduko de la Germana poemo "Frühlings Ankunft" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2011-01-25.*

MR-522-1 / Arg-848-1712 (2013-02-28 19:14:46)